



proksime de la insulo "Gaou" (83)

# espéranto Provence

kvaronjara gazeto de la Provenca Esperanto-Federacio n° 105 - somero 2016

## federacia retejo

[www.esperanto-provence.org](http://www.esperanto-provence.org)

## nia federacio sur Facebook

[www.facebook.com/  
esperantoprovence](http://www.facebook.com/esperantoprovence)

## prezidanto

Pierre Oliva

2772 Montée du Vieux Camp  
83330 Le Castellet  
06 76 55 57 23  
[nlpolecamp@gmail.com](mailto:nlpolecamp@gmail.com)

## baza kotizo por aliĝo

(kun la gazeto) : 6€

ĉeko al :

"Espéranto-Provence"  
pere de via loka asocio  
aŭ sendota al la

## kasisto

Nicole Lafitte  
2772 Montée du Vieux Camp  
83330 Le Castellet  
[nlpolecamp@gmail.com](mailto:nlpolecamp@gmail.com)

## sekretario

## redaktoro kaj enpaĝiganto

Pascal Vilain  
61 Montée du Castelar  
83460 Taradeau  
06 42 19 68 51  
[p.vilain83@orange.fr](mailto:p.vilain83@orange.fr)

## limdato por sendo de publikotajoj por la venonta n°

25-a de Septembro 2016

bonvolu sendi al la supra retadreso  
antaŭdankojn pro viaj kontribuaĵoj

*specia numero*

## memorigaĵoj pri la EÜROMEDITERANEA ESPERANTO-KONGRESO

## Vorto de la Prezidanto

*Espéranto-Provence* multe laboris dum la ses pasintaj monatoj.

La kongreso de *Espéranto-France* estis sukcesa kaj senprobleme disvolvigis. Intertempe alvenis la somero, feria sezono. Laüplaĉe, vi povos studi en Greziljono, Kvipetal... aŭ vojaĝi en Esperantujo tra nia lando aŭ eksterlande.

Al ĉiuj membroj de nia federacio mi deziras aktivan someron, plezurojn, ripozadon... kaj agrablajn siestojn al la Provencanoj !

*Pierre Oliva*

## La jara kongreso de *Espéranto-France* en Marsejlo

## Vizitinda urbo, vizitinda kongreso

*Espéranto-France* komisiis al *Espéranto-Provence* organizi la jarajn kongresojn. Elektita estis *Marseille*, kaj kongresejo iĝis CANOPE, salonaro ĉe la piedoj de la stacidomo, do bele lokita en la centro mem, ĉirkaŭita de manĝejoj, restoracioj kaj hoteloj. Pro la situacio en Francio, la organizantoj decidis ne preni financajn riskojn kaj sekve organizis nur piedajn vizitojn de la urbo (al la Malnova Haveno, la nekonata kvartalo *Le Panier*, *Palaco Longchamp*, *Pointe-Rouge*, *Notre-Dame de la Garde* aŭ *Cours Julien*). Same, trajna ekskurso malkovrigis la belan itineron laŭ la Blua marbordo ĝis *Port-de-Bouc*.

Alia decido de la LKK estis prezenti Esperanton al la publiko : afišoj kaj brila ttt-ejo invitis al prelegoj pri lernado de lingvo ĉe *Equitable Café*, pri *Makhno* (Ukraina anarkisto) kaj *Ukrainio*, ne parolante pri la diversaj kaj altkvalitaj kulturaĵoj : koncerto de jOMO, kiu tiel kapablas vivigi la lingvon, koncerto de humanistaj kantistoj el *Marseille* : "*Soit Dit En Passant*", kiuj tradukigis kaj eklernis du kanzonojn en Esperanto, teatraĵo de la Cikadoj el *Aix-en-Provence*, arta ekspozicio de *Bernard Briançon*, membro de la Eo-klubo en *Le Beausset*.

Nova provo estis multigi la nombron de prelegoj aŭ prelegetoj (peĉakuĉoj kun bildo) por kuraĝigi novajn homojn interveni publiki kaj faciligi la aŭskultadon de novuloj, kiuj ne povas koncentriĝi tro longe. Tre variaj estis la prezentoj : "Pytheas", "Transatlantika traktato", "metrooj de la mondo", "Victor Lebrun, sekretario de Tolstoj", "valsoj", "infanaj petolaĵoj", "Kumeŭaŭa, filo de la ĝangalo", "nuntempa Rusio" kaj tre diskutita temo pri "la ruĝaj ŝlimoj".

Gustumado de "pastis" (anisa loka alkoholo) kaj "tapenade" (olivmiksaĵo) estis tre bonvena. Ankaŭ la laborkunsidoj, ekz. pri "Esperanto al junaj lernejanoj", aŭ "nova distribuo de la revuo *Le Monde de l'Espéranto*" diskutigis la membrojn, same la statuta membro-kunsido.

Konklude : sukceso por tiu tre vivanta renkontiĝo.



## Kongresa fotogalerio

### 1 - la kongresejo



*je kelkaj metroj  
de la fama  
stacidoma ŝuparo...*



*la kongresejo  
"CANOPE"  
(eksa CRDP)...*



*kie senlace dejoris  
Pierre kaj Michel  
ĉe la akceptejo*



*komforta kaj vasta  
salono pretis por  
prelegoj kaj spektakloj*



*dum alia atendis  
la trink-kaj-ripoz-  
emulojn*

### 2 - prelegoj - diskutoj



*Jean-Marc Leclerc  
"Oktitanlingvo per  
Esperanto" kaj  
"Nestor Makhno"*



*Monique Arnaud  
"Por bona lernado  
de lingvoj"*



*Hannes Larsson  
"Valsoj"*



*Patrick Lagrange  
"Pytheas kaj  
Mediteraneo"*



*Rosy Inaudi  
"Ruĝaj ŝlimoj,  
poluado de  
Mediteraneo"*



*Thierry Spanjaard  
"ITAP" kaj  
"Metroomapoj"*



*Pierre Tell Bouvier  
"La perdita ŝlosilo"*



*Anne Jausions  
"Kumeŭaŭa,  
filo de la ĝangalo"*



*Michel Ahado  
"Petoloj"*



*Renée Triolle  
"Rusio hodiaŭ"*

### 3 - spektakloj



jOmO



Soit Dit En Passant



La Cikadoj



Flavie Wakako-Audibert

"Hafu"

### 4 - ekskursoj



Anne kaj Claude Jausions, Brian Moon, Marc Gallardo, Renée Triolle kaj eble aliaj malkovrigis la ĉefajn urbajn vidindaĵojn : la Canebière, la Malnovan Havenon, la Palacon Longchamp, la Kvartalon Le Panier...



okazis ankaŭ ŝipekskuro al Pointe-Rouge, busa irado al Notre-Dame de la Garde, trajna ekskursa laŭ la Blua Marbordo...

## Marseille en vedette La jara kongreso de Esperanto-France

Faire venir les gens à Marseille et changer l'idée que les gens s'en font faisait partie des buts du comité d'organisation du congrès d'Espéranto-France.

Mission accomplie: plus de 60 participants n'avaient jamais mis les pieds dans la capitale méditerranéenne. «On ne connaît de Marseille que les règlements de compte et l'OM» ; «Ce n'est pas "Plus belle la vie" ou "Caïn" qui vont changer l'idée qu'on s'en fait !» Aussi les visites guidées ont-elles fait le plein : de la gare à la Mairie ; de la gare au Palais Longchamp ; le Panier ; Marseille insolite ; La Pointe Rouge (avec retour en bateau) ; le Cours Julien ; Notre-Dame de la Garde. Un après-midi a été consacré au voyage en train par la Côte Bleue jusqu'à Port-de-Bouc, à la grande surprise du représentant de "La Provence" : peu de touristes visitent cette ville ouvrière, née à la fin du XIXème de l'arrivée de la pétrochimie et moribonde au XXIème.

Le thème "Marseille, porte de l'Euroméditerranée" a été traité par une conférence sur Pythéas, qui donne la latitude de Marseille. Patrick Lagrange, guide de pays et astronome amateur, a su rendre abordable pour tous un sujet qui aurait pu être ardu. Rosy Inaudi, élue départementale, a sensibilisé le public au scandale des boues rouges.

Jean-Marc Leclerc a présenté l'occitan et l'Occitanie ainsi que la république anarchiste de Makhno en Ukraine. Les participants étaient invités à noter les langues officielles ou régionales sur une carte qui en a surpris plus d'un : en haut de l'affiche, Gibraltar, en bas Israël et le Liban !

Mais l'espéranto, c'est aussi l'occasion de compléter sa culture ou son éducation - l'histoire de la valse (Hannes Larsson), les métros du monde (Thierry Spanjaard), Victor Lebrun, ancien secrétaire de Tolstoï (Renée Triolle) ; « Kumewawa, le fils de la jungle », traduit de l'espéranto en français par Anne Jausions, souvenirs d'enfance (Michel Ahado) - ou de s'ouvrir encore plus au monde. Ainsi "Le traité trans-atlantique" (Thierry Spanjaard), conférence-débat sur la Russie (Renée Triolle) ou le film de Nathanaël Coste et Marc de la Ménardiére : "En quête de sens", sous-titré en espéranto, ont donné lieu à des échanges animés.

«Notre idée, c'était aussi de donner aux Marseillais l'occasion de découvrir la langue internationale.» déclare le président du Comité Organisateur. Pari réussi lors de la conférence "Nul en langues ? Plus jamais !" à l'Equitable Café ; lors des spectacles : concert de jOmO, en route pour le festival de Berlin ;

concert de Soit Dit En Passant, le groupe "solidaire et humaniste" de Marseille qui, pour l'occasion, a traduit et interprété deux titres en espéranto ; pièce de théâtre "La viro-semo" de Violette Ailhaud, jouée par la Cikadoj d'Aix en Provence ; spectacle de danse "Hafu", encore "en chantier", suivi d'un échange avec le public où se mêlent les deux cultures française et japonaise de Flavie Wakako Audibert ; lors d'une exposition, enfin : celle des œuvres picturales et photographiques de Bernard Briançon, qui mêlent art et espéranto.

Mais le congrès, c'est aussi le moment privilégié de l'association Espéranto-France pour discuter de ses objectifs. A l'honneur cette année, l'initiation à la langue internationale dans les activités périscolaires


en primaire (rappelons que c'est grâce à Jean Zay que l'espéranto a droit de cité dans les écoles en France), la diffusion libre sur internet de la superbe revue "Le Monde de l'Espéranto" ou l'évolution de la langue internationale. Réunions du Conseil d'Administration, Assemblée Générale d'Espéranto-France et d'Espéranto-Provence, examens de l'Institut Français d'Espéranto ont complété ce programme particulièrement dense.

Le lieu du congrès Canopé, aux pieds des escaliers de la gare Saint-Charles, était idéalement placé, avec snacks, restos ou hôtels à proximité, même si les familles roms qui vivent à l'entrée ont renforcé l'idée de Marseille ville pauvre, envahie de migrants.


## 5 - kaj ankaŭ...



*Susanna Beglaryan  
zorgis kiel kutime  
pri la librosvarto*



*arta ekspozicio  
de verkoj  
de Bernard Briançon*



*filmo  
"En quête de sens"  
kun subtitoloj en Eo*

*multaj interesiĝantoj  
por gustumado  
de pastis*



*bankedo  
ĉe MundArt  
unu el la pluraj  
komitatataj, membraj  
aŭ fakaj kunsidoj,  
kiuj okazis  
dum la kongreso*



## Examens de l'Institut Français d'Espéranto

Ĉiujare, Espéranto-Provence organizas sesion de ekzamenoj de Franca Esperanto-Instituto. Tiuj ekzamenoj ne konkurencas, male kompletigas la eŭropajn KER-ekzamenojn, ĉefe por la unua kaj dua gradoj.

Dum la kongreso, malgraŭ la plenplena programo, sesio okazis la 5-an de majo de la 13.30 ĝis la 19. Kandidatiĝis 7 lernantoj al la unuagradon (5 el Provenco, 2 el aliaj lokoj ; ni notu, ke iu venis speciale el Grenoblo por la ekzamenoj, kaj tuj reiris al la laboro !) kaj unu al la dua. Gratulojn al ili !



Dankojn al la prizorganto, Monique Arnaud, kaj la jurianoj Patrick Lagrange kaj Renée Triolle.

Pliaj detaloj pri FEI ĉe la ttt-ejo :

<http://www.franca-esperanto-instituto.net>

*pri la tuto raportis dulingve Renée Triolle - fotoj de Thierry Spanjaard, Michel Cerisay kaj Pascal Vilain  
bonvolu pardonu la protokolinton kaj gazetredaktoron pri forgesitaj programeroj aŭ fotoj - ne eblis ĉion enmeti*

## Prelegturneo de Dagestano en nia regiono

Kiam *Espéranto-France* invitas eksterlandanon prelegi, *Espéranto-La Ciotat* ĉiam kandidatiĝas. Eĉ se la fino de la lernojaro aŭ la Ĉampionkonkurso pri futbalo tiris publikon aliloken, bone sukcesis la akcepto de *Abdurharman Junusov*, ĵurnalisto ĉe televido en Dagestano.

Alveno merkredon la 15-an de junio el *Gap*, kie li intervenis en lernejaj klasoj en *Saint-Bonnet-en-Champsaur*, rapida vizito al la Malnova Haveno (en la bruego de futbalaj fanaticuloj) antaŭ prelego ĉe *Cira*.



en lernejo de *Saint-Bonnet*, A. Junusov  
kun Monique Arnaud kaj instruisto de la itala.

Jaŭdon, en *La Ciotat*, tagmanĝo kun esperantistoj ; rapida promeno al la fjordeto *Figuerolles* kaj malnova urbo, prelego en *Le Grand Portique*.

Vendredon, ekskursio al *Le Beausset* por viziti la Turismoficejon ; tagmanĝo ĉe *Pierre* kaj *Nicole* kun novaj lernantoj, kafo ĉe la naĝejo kaj posta vizito de *Le Castellet*.



prelego en *La Ciotat*

Kion ni lernis pri Dagestano ? Ĝi estas malgranda (50.000 km<sup>2</sup>) inter Kaŭkazo kaj ĝiaj surmontaj vilaĝoj kaj Kaspia maro kaj ĝiaj belaj sablaj plaĝoj, najbaro de Ĉeĉenio. Laŭ anekdotoj, Dagestano estis "La Paradizo" por Orientuloj. Ĝi estis ĉe kruciĝo de oriento kaj okcidento, sur la Silka vojo, sed antaŭe ĝi estis kordoro por ĉiuj invadantoj : Persoj, Romianoj, Mongoloj, Araboj, Rusoj. Ĉiuj lasis spurojn. Sekve miksigis kvardeko da lingvoj kaj diversaj religioj, kiuj ĉiam bone kunvivadis. Dagestananoj estas fieraj batalantoj (multaj el ni pensis pri Korsiko) sed neniam batalis inter si, ĉiam grupiĝis kontraŭ la aliaj.

Evidente, esperantistoj interesigis pri lingvoj : 40 oficialaj, naciaj gazetoj en 14 lingvoj, naciaj teatroj en 7 lingvoj, parolata estas cento da lingvoj, kaj la rusa (de la antaŭa imperiismo kaj posta Sovetunio) estas la interpopola. La lokaj lingvoj konserviĝis en la vilaĝoj, malpli en la ĉefurbo, Mahaĉkala (laŭ la nomo de revoluciulo), antaŭa *Petrovsk* (ĉar fondita en 1712 de Petro la Unua) sed daŭre nomata de la maljunuloj Anĝi !

Multaj demandoj rilatis al religioj : ateista 70jara soveta periodo konservis la diversajn religiojn (kristanaj kaj islama). Nun aperas grandiozaj moskeoj pagitaj de Azerbajdžano aŭ aliaj, junuloj iras al Sirio kaj Saûda Arabio por trejniĝi, sed la ribelo organizita de Ĉeĉenio ne sukcesis.

Aliaj demandoj rilatis al ekonomio : kial "paradizo", kiu abunde produktas legomojn kaj fruktojn, vinon kaj konjakon, kies maro produktis kaviaron kaj liveris multajn fiŝojn, disponas pri gaso kaj petrolo... iĝis la plej malriĉa respubliko de la Federacio de Rusio ? Frakasiĝo de la industrio kiam forfalis Sovetunio, kaj ĉefe tro da korupto kreis grandan senlaborecon...

Rilate homajn rajtojn (nia gasto zorgas pri la rajto de la enprizonigitaj), Dagestano havas la plej liberajn amaskomunikilojn, kiujn ĉiuj sopiras en Rusio. Eblas ĉion skribi pri politikistoj, tamen 5 ministroj pri informado estis mortigitaj ! Kaj tiuj profesioj (ministro pri informado, ĵurnalisto kaj policisto) estas la plej danĝeraj profesioj.

Dum siaj prelegoj kaj privataj konversacioj kun esperantistoj, *Abdurharman* miksis anekdotojn, humurajojn, legendojn kaj nunajn pripensojn pri sia lando. Kiam oni petas de li, kio li estas, se li estas eksterlande, li respondas "Ruso" ; se li estas en Rusio "Dagestanano" ; se li estas en Dagestano "Lako" laŭ sia denaska etno. Tio bele konkludas la kunvivadon inter la popoloj de Dagestano. *raportis Renée Triolle*

*Li diris...*



**Umberto Eco**

(1932 - 2016)

philosophe, écrivain, essayiste,  
sémiologue et linguiste

**"Les gens perçoivent toujours l'espéranto comme la proposition d'un instrument. Ils ne savent rien de l'élan idéal qui l'anime. C'est pourtant la biographie de Zamenhof qui m'a enchanté. Il faudrait que l'on fasse mieux connaître cet aspect-là !... Le côté historico-idéologique de l'espéranto reste foncièrement inconnu."**

*alia teksto pri la turneo de A. Junusov estis skribita de Nicole Lafitte kaj Pierre Oliva... jen ĝi...*

La membroj de la klubo «Espéranto-Le Beausset» havis la plezuron akcepti, en tiu komenco de turisma sezono, la 17an de junio, ĵurnaliston el Dagestano : *Abdurharman Junusov*.

Dagestano estas eta aŭtonoma respubliko de la Rusa Federacio, marborde de Kaspio kaj piede de Kaŭkazo. Ĝia loĝantaro enhavas 40 popolojn kaj 40 lingvojn, kun ĉiuj malfacilaĵoj, kiuj rezultas el tio.

Evidente, Esperante li parolis al ni pri sia lando : ĝiaj historio, kutimoj, naturaj kaj arkitekturaj belaĵoj, ekonomio. Laŭ *Abdurharman Junusov*, la riĉofontoj por nutrajkultivado sufiĉas por la popolo.

Tamen li bedaŭras la malaperon de ĉiuj industrioj ek de la disiĝo de Sovetio.

Nur la Kaspia merkato ebligas maran ekonomieton. Feliĉe, la turismo multe kreskas.



*en la turismoficejo en Le Beausset*

Nia invitito multe ŝatis la turisman faldfolion esperantilingvan pri *Le Beausset*, la vendredan bazaron kaj ankaŭ la provencajn mangajojn.

Estis belega kaj riĉa tago, kiu ebligis al niaj lernantoj reale uzi nian lingvon kun samideano alveninta el tre fora lando, ne scipovanta paroli la francan.

## **El la regionaj asocioj**



### **04 - EKEM - Esperanta Kulturo en Manosque**

1er au 3 juillet : Festival «À propos du Japon». Nous avons eu une petite place à l'Office de Tourisme pour présenter sur une grille la correspondance entre des élèves de Sainte-Tulle et des élèves japonais grâce à l'espéranto.



*quelques amis de Manosque*



*avec Flavie Wakako-Audibert, venue de Marseille pour assister au festival "À propos du Japon"*

#### **Correspondances**

En septembre auront lieu les fameuses « Correspondances » de Manosque.

Comme d'habitude, EKEM y participera. Voici le programme de nos interventions :

**jeudi 22** – 10 h à 17 h - «Internacia Skribejo» - Atelier de correspondance

Porte de la Saunerie-Promenade A. Millot

Espéranto-Manosque propose aux jeunes et adultes, depuis l'écritoire international, d'envoyer en langue internationale espéranto des messages préparés pour étonner, intriguer... Les curieux seront initiés à la facilité de l'espéranto par des activités ludiques.

**vendredi 23** – 9 h à 16 h 30 - «Komuniku per Esperanto» - Atelier de correspondance scolaire (Cours Moyens, Collèges, Lycées)

Maison des Associations - Bd. du Temps Perdu  
Espéranto-Manosque propose aux jeunes, depuis l'écritoire international, d'envoyer vers d'autres jeunes espérantistes de divers pays de grandes cartes postales collectives en langue internationale espéranto. Celles-ci seront composées de phrases préparées sur Manosque, avec des collages, dessins, photos. Les curieux seront initiés à la facilité de l'espéranto par des activités ludiques, B.D, film, expo.

**samedi 24** – 10 h à 20 h 30 - Journée Porte ouverte sur l'espéranto - Information, animations, ateliers

Maison des Associations - Bd. du Temps Perdu  
Pour la Journée Européenne des Langues, Espéranto-Manosque vous propose de découvrir la langue internationale équitable. Sur place : expo, films, musiques, foire aux questions, atelier de correspondance et d'apprentissage, animations tout âge, lecture bilingue (texte de Giono)... et le verre de l'amitié.  
à 18 h : projection du film «En quête de sens» (témoignages divers sur les rapports de l'homme avec la nature, en français, sous-titré en espéranto).

Infos et inscriptions : 06.84.88.13.91  
[esperantomanosque@gmail.com](mailto:esperantomanosque@gmail.com)



## 13 - Centre Culturel Espéranto-Marseille

Le dimanche 17 avril, de 11 h à 12 h, une heure a été consacrée à l'espéranto dans le cadre de "Orientisimo", l'émission de la radio marseillaise RJM, 90,5 Mhz.

Thierry Spanjaard, président du comité d'organisation du Congrès Euroméditerranéen d'Espéranto, et Rosy Inaudi, membre du comité d'organisation, ont été interrogés par Claude Allali.

Ce fut l'opportunité d'informer les marseillais sur la langue comme sur le mouvement espérantiste, et de leur donner l'envie de participer au congrès. L'émission peut être réécoutée en suivant ce lien :

<https://www.dropbox.com/s/h7mw192dozsglje/17042016-ITW%20claude%20esperanto.mp3?dl=0>



## 83 - Esperanto-Klubo Fréjus - Saint-Raphaël

### Taradeau, village-espéranto

Perché sur une des collines des Maures, au-dessus du vignoble varois, Taradeau a mis en valeur sa tour Taradel et restauré entièrement la petite chapelle qui appartenait à l'évêché de Saint-Victor et était à l'origine entourée du village, reconstruit aujourd'hui le long de la rivière. Un magnifique panorama s'étend aux pieds des visiteurs, parmi eux plus d'une vingtaine d'espérantistes de la région, venus à l'invitation de Pascal et Mari-Roza Vilain.

Ce type de rencontres permet aux gens de pratiquer la langue internationale (il faut bien s'entraîner pour être performant dans les rencontres internationales !) et plonge les débutants dans un véritable bain linguistique. De plus, les échanges informels (de plats faits maison ou d'idées) renforcent les liens amicaux.

Après la visite de la tour et du cimetière, tous se sont retrouvés chez les Vilain autour d'un café et de gâteaux pour un mini-programme culturel : chansons avec Michèle Freud, poésie sur les femmes par Anita Collomb et sur la ville par Pascal, tous deux primés à un concours européen de poésie.

aŭdiĝas Esperantaj kanzonoj  
kaj poeziajoj



pikniko  
ĉe la supro  
de la vilaĝo



Vera plezuro estis renkontiĝi por simpla praktikado kaj interŝanĝoj en la internacia lingvo. Por kelkaj estas pli facile krokodili eĉ se ili agnoskas, ke la «lingva bano» alkutimigas iliajn orelojn al la bona lingvo.

Kiel kutime, interŝanĝiĝis la manĝaĵoj : festivalo de legomaj tortoj, porkaĵoj, salatoj, fromaĝoj.

Homoj venis el Nico, Tulono, Agay, *Les Arcs-sur-Argens*, Fréjus, Saint-Raphaël, Pignans, Le Castellet, La Ciotat kaj evidente Taradeau.

Post ampleksa manĝo, la plej kuraĝaj supreniris al la turo, nevizitebla pro risko ; interesa estis la vizito de la tombejo kaj legado de la familiaj nomoj.

La tuta grupo iris al la domo de ge-Vilain, kiuj gastigis per kafo aŭ alia trinkaĵo, kun diversaj kukoj, dum «kultura programeto» aŭdigis kanzonojn en Esperanto far *Michèle Freud*, premiitajn poeziajojn pri virinoj far *Anita Collomb*, pri urbo far *Pascal Vilain*.

raportis Renée Triolle

### Seslingva reta versio de la kurso: Zagreba Metodo

Aperis reta versio de la kursmaterialo de Zagreba Metodo. *Georg Jähning* ellaboris retejon kaj kun la permeso de la aŭtoro de la materialo Zagreba Metodo aperigis interagan version de la kurso. La 12 lecionoj de la libro alireblas el ses lingvoj : germana, angla, franca, hispana, ĉina kaj malajzia. Ĉe la unuopaj lecionoj, la lernantoj povas vidi kaj aŭskulti en bona prononco la tekston, povas trovi ankaŭ la novajn vortojn, klarigojn pri la rilata gramatiko kaj solvi kelkajn interagajn ekzercojn. Al la lecionoj aldoniĝas ankoraŭ kelkaj resummaterialoj, ekz. la korelativa tabelo, listo de prepozicioj, afiksoj kaj kelkaj laŭtemaj vortlistoj. En la vortostoko de la materialo eblas serĉi laŭ la ses lingvoj. La programo estas libere uzebla kaj komputile kaj en modernaj aplikaĵoj, kiel sagtelefonoj.

Vidu ĝin ĉe [learn.esperanto.com/](http://learn.esperanto.com/)

informis Edukado.net

## ZEO-oj en PACA > 2 - Arles (sekvo)

*En la n° 104 de via gazeto, mi anoncis, ke vi povos legi anekdotojn pri rilato inter H. Bourdelon kaj Frédéric Mistral, pri Jeanne Calment kaj Esperanto. Jen ili...*

*Extrait de l'ouvrage de Jean-Claude Lamy :*

*«Le mystère de la chambre Jeanne Calment» (Fayard – 2013 – chapitre 7)*

*(Jean-Claude Lamy a été récompensé par le Prix Goncourt de la biographie pour Prévert, les frères amis (Robert Laffont, 1997) et par le Prix Cazes-Brasserie Lipp pour Mac Orlan, l'aventurier immobile (Albin Michel, 2002). Curieux de tout, au cours de son enquête sur le «cas» Jeanne Calment, il se livre à de brillantes incursions dans les domaines de la peinture, de la littérature, des découvertes scientifiques. Ce sont 122 ans d'histoire qu'il revisite en compagnie de celle qui détient encore le record absolu de longévité.)*

"En 1908, trois ans après le 1er Congrès universel d'espéranto à Boulogne-sur-Mer en présence du docteur Louis-Lazare Zamenhof, son initiateur, fut créé à Arles un groupe espérantiste composé essentiellement de jeunes félibres. Des cours publics étaient donnés le soir à l'école de la Roquette. Et ce fut à Arles que se tint le 1er congrès de la Fédération espérantiste de Provence. Une brochure, *Tra Provenclando (À travers la Provence)*, fut imprimée. Ce numéro un reste l'unique et dernier numéro, car il parut en août 1914 : la guerre venait d'être déclarée. Ferdinand Calment en était un des rédacteurs.

Toutes les correspondances partaient de son adresse : 4, rue Gambetta, c'est-à-dire la maison qu'habita Jeanne Calment jusqu'à son arrivée à la maison du Lac en janvier 1985.

Doyenne des espérantistes, elle reçut le 26 août 1982 ce numéro historique de 1914. Il avait été retrouvé dans les archives d'Honoré Bourdelon, un des fondateurs du groupe. En 1980, à l'occasion du 150e anniversaire de la naissance de Frédéric Mistral, Honoré Bourdelon, 88 ans, avait évoqué ses souvenirs liés à l'auteur de *Mireille*.

«En mars 1912, j'avais 20 ans et j'étais un jeune instituteur, non titulaire. Je faisais des remplacements à l'école de Graveson. Tous les jeudis, je rentrais à Arles passer la journée dans ma famille et je repartais le soir à Graveson.

Un jeudi soir, je vois une personne bien vêtue monter en 1<sup>ère</sup> classe et moi, je monte en 3<sup>ème</sup>. Arrivés à Barbentane, nous nous retrouvons tous les deux sur le quai de la gare et c'est alors que je reconnaissais le

Maître Frédéric Mistral. Je m'avance vers lui et je le salue. Étonné, il me dit : «Qui êtes-vous, jeune homme ?» Je lui explique que je suis le jeune instituteur qui fait des déplacements à Graveson. «Bien, dit-il, nous allons attendre la patache qui dessert Graveson-Maillane-Eyragues.» Nous faisons la route ensemble. Pendant le trajet nous avons bavardé. Je lui dis que j'appartiens au groupe espérantiste d'Arles. Je lui demande ce qu'il pense de la traduction récente de *Mireo*. Il a un moment de réticence avant de me dire : «Ce que je vous reproche, c'est que tout n'a pas été traduit». Et il ajoute : «Je reconnaiss que les traductions en une seule langue, l'espéranto, peuvent faire mieux connaître la littérature, les mœurs et les coutumes d'un pays dans le monde.» Ainsi aurait-il souhaité que ses Mémoires fussent traduits en espéranto."

En 1908, le groupe espérantiste d'Arles était composé de jeunes, la plupart "félibres" : Émile Fassin, Honoré Bourdelon, C. Chaix, H. Dayre, Jack d'Esperys, Marius Fayard, Louis Laget, Étienne Laget, Henri Porte-Sarnette, Jean Borelly et Magali.

L'un d'eux, Marius Fayard, a composé en provençal le poème «À l'espéranto», «dédié au groupe d'Arles et à son président, mon ami : L. Laget». Ce poème a été traduit en espéranto par Kapitano Martin.

Ni grupiĝu sub la Stelo  
radianta sur la mondon,  
ĝia lumo al ni montras  
la esperon de l' Estonto,

Esperanto en la mondon  
alvenigu la Esperon  
la Amon kaj la Veron,

ĝi nin gvidas, ĉie regas  
brilegaĵo de vesper'  
Amon, Pacon, ĝi ŝatigas,  
paca signo en aer'.

dissaltigu ĉiuj baroj  
la popolojn disigantaj,  
baldaŭ regu la Fratec'.



*Congrès départemental de la Libre Pensée des Bouches-du-Rhône à La Barben, en 1977. Honoré Bourdelon est à gauche sur la photo.*

### *Pri Honoré Bourdelon, memorajo de Renée Triolle :*

"Mi neniam atentis, ke sur la tombo de *Honoré Bourdelon* estas memortabulo. Mi havis la ŝancon lerni Esperanton kun li je la 3a kurso. Mi tiam estis studentino de la rusa lingvo, revenis aŭtobuse el la universitato, suprenkuris al la lernejo (apud *Equitable Café*, kie nun kunvenas esperantistoj en *Marseille* la 1an jaŭdon de la monatoj), kie li akceptis min per tiuj vortoj "Remettez-vous, Renée" kaj eklegis aparte tedan libron : "La rabeno de Bakhakha" ! Poste ni, studentoj el SERAM (Studenta Esperantista Rondo de Aix-Marseille) uzis lian ink-mašinon por multobligli la informilojn, kiujn ni disdonos al la studentoj, aŭ la studentan bultenon "*Esperantix*", kaj finis la multobligadon kun inko ĝis la kubutoj ! Ankaŭ lia edzino estis bona esperantistino kaj bezonis duan valizon por porti al la UK-oj arlezan kostumon, ĉar estis la kutimo, ĝis la 60aj jaroj, montri la universalecon de Esperanto per surmeto de regionaj kostumoj dum la oficiala malfermo.

Esperanto ne estis la sola fako en kiu *Honoré Bourdelon* fakis : li eldonis ĉe popolscienco eldonejo "*Marabout*" libreton pri uzo de plantoj por sane vivi aŭ saniĝi : "*Votre santé par les plantes*".

Kaj... "pri la du filoj, mi memoras, ke unu estas la fotisto kaj filmisto de fama antropologo."

(n.d.l.r. : *veršajne temas pri Georges Bourdelon, kiu laboris kun famaj etnologoj, Henri Lhote, Louise Weiss, Noël Ballif... En Arles plu aktivas "Association des Amis de Georges Bourdelon"*.

*Merci à Huguette Rozzonelli, du Service Culture de la Mairie d'Arles, qui m'a fait parvenir la brochure : "L'aventure de l'objectif - Georges Bourdelon", éditée par cette Association des Amis de G. Bourdelon.)*

### **"Tra Provenclando"...**

Dans le n° 94 du Bulletin des Amis du Vieil Arles, paru en septembre 1996, l'article « Provençal et espéranto », que l'on doit à un espérantiste arlésien très actif, Gustave Blary, nous en apprend un peu plus sur l'unique numéro de « Tra Provenclando » :

... son titre est en lettres rouges sur un décor représentant la cuisine provençale et une cabane de gardian. Datée d'août 1914, elle porte le n°1 de la première année de parution; l'unique et la dernière car la guerre était déclarée, les jeunes espérantistes étaient rappelés pour une longue période. Cette brochure avait pour but de faire connaître l'espéranto au monde entier, les us et les coutumes de la Provence, la langue provençale, la poésie provençale, la cuisine provençale, en un mot, tout ce qui se rattache à la Provence.

Voici le contenu de ce premier et unique bulletin rédigé en langue espérantiste:

- la présentation du programme projeté : où Louis Laget, directeur du mouvement arlésien depuis 1910, frère de Etienne Laget (1896-1990) célèbre peintre et aquarelliste arlésien de ce siècle dont une rue porte le nom à Trinquetaille, détaille son programme en ces termes à la page 1 :

"En recevant une nouvelle revue espérantiste... car il nous semble qu'on pourrait propager la langue provençale par l'espéranto ; certainement la première, grâce à sa belle littérature, a traversé le pays où elle est parlée, et même dans les universités lointaines, elle est étudiée méthodiquement et diligemment.

Mais l'espéranto peut lui apporter de nouveaux adeptes dans toutes les couches de la société. Sa valeur se fera connaître, non seulement, par son harmonie et son élégance, mais aussi par son idée interne. La langue provençale a en elle-même un idéal particulier qui apparaît dans les déjà nombreuses œuvres des "félibres".

Si l'espéranto porte avec lui l'amour de la Patrie, la langue provençale est un chant remarquable à la petite patrie. Hélas, on se moque souvent sans raison de l'une et de l'autre."

*Pour lire l'intégralité de l'article de G. Blary, en page 21 du bulletin, il est possible de télécharger le PDF du n° 94 en suivant ce lien :*

<http://www.amisduvieilarles.com/assets/files/bulletin/s/pdf/94p.pdf>



*un grand merci à Micheline Chateau, du Musée national de l'espéranto de Gray, qui a bien voulu scanner et envoyer plusieurs pages de ce n° unique de "Tra Provenclando".*



## La federacianoj esprimas sin...

### poezie...

Anita Collomb kaj Denise Loisel trovis anoniman tekston franclingvan, kiun ili tradukis Esperanten...

### Esperanto aŭ jankilingvo ?

Esperanto ? Jes ja, la lingvo, kiu prosperas.  
 La morgaŭa lingvo, kiun la Mond' esperas,  
 Naskita el mens-geniulo : Zamenhof.  
 Kontraŭ la maljusteco, kontraŭ l' abomeno,  
 Lia koro sangas pro la misakordo.  
 Frue li konsciis, ke ĉiu malpaco  
 Ĉefe devenas el la nekompreneblo,  
 Ke la diverseco de lingvoj sur Tero  
 Ne estas favora al homa konkordo.  
 Kaj konklude, por li, devis esti solvo :  
 Krei idealan, tolereman ilon,  
 Kiu faciligus, dank' al interŝanĝo,  
 La komunikadon por foriri el ĝi.  
 "Euréka" ! Baldaŭ sukcesos la pensulo :  
 Doni al la homaro - por ke la geto  
 Lingva, ŝovinisma, ne nasku la militon -  
 Universalan lingvon, kaj sur Tero Pacon.  
 Jes, la nura lingvo, per kiu ni povas  
 Akordigi, interkomprenebla racie,  
 Posedo de ĉiuj, tamen de neniu,  
 Esperanto, certe, ilo kiu donacas  
 Ligon por Amikeco, en Frateco,  
 Lasante al ĉiu propran identecon.

### proze...

De Luc Barbulesco, nova federaciano, kiu duontempe loĝas en Cannes, mi ricevis la jenan tekston :

nous sommes tous Grecs - ou singes -  
 selon les circonstances  
 il serait temps d'être des hommes

*ni ĉiuj grekoj estas - aŭ simioj - laŭvice  
 alvenis la tempo, ke ni homoj estu*

Le Pirée pour un homme / Pireon por homo

Si quelque voyageur venu des Etats de la Lune en Europe aujourd'hui cherchait à se faire une idée, mieux, proposer une définition de l'Europe, il dirait sans doute à peu près ceci : c'est un vaste camp où l'on retient

par milliers des misérables chassés par la guerre, au nom de valeurs telles que : solidarité, dignité humaine, liberté... Ces mots, déjà passablement absurdes, se trouvent chargés, dans les circonstances présentes, d'une cruelle ironie.

La prospérité apparente et le bon ordre qui régnaient jusqu'à une époque récente en cette région du monde n'étaient dus qu'à l'exploitation impitoyable du reste du monde, exploitation soutenue au besoin par la guerre, sous toutes ses formes : encouragements à la dissension civile, bombardements, invasion... et ce, dans l'oubli complet des origines mêmes de ladite Europe : c'était une jeune fille arabe (syrienne), séduite par un Grec se faisant passer pour un dieu - ou bien par un dieu se faisant passer pour un taureau - puis abandonnée. Son frère, venu la rejoindre, aura fondé la plus grande cité de Grèce après s'être battu contre de vaillants guerriers - curieux, ce thème récurrent de la résistance armée contre des envahisseurs qu'on est allé chercher...

Ces naïfs réfugiés s'imaginent, à l'instar du singe naufragé de la fable, à califourchon sur un dauphin providentiel, qui l'interroge sur ses projets, et s'il connaît le Pirée, que ce nom est celui d'un homme... Oui, c'est le nom d'un homme cruel, aux yeux de qui les voyageurs venus de l'autre côté de la mer sont des singes, et quant à Europe, c'est celui d'une femme trompée...

Mais laissons notre hôte venu des Etats de la Lune conclure en son propre langage :

*Vere ĝis hodiaŭ alvenis tia tempo kiam Vi ĉiuj, homoj bonvolaj - kaj ne gravas de kiu ajan regno aŭ nacio Vi devenus - eksciu la Vian devon je la senlima senacieca homaro, kaj tiun ĉi eŭropian senordan ordon senindulge polvigu !*

### fote / poezie...



Profundegas la vund'  
 jam tute sensava ;  
 en sufer' la metal'  
 scias, ke venas fin'.  
 Ĝin forlasas fortar',  
 elverŝiĝas larmar'.

Livani

## Paĝo de la komencantoj (ĉu nur... ?)

### teksto en facila Esperanto

Ezopo, la fama fabloverkisto<sup>1</sup>, estis antaŭe sklavo de severa komercisto. Ĉi tiu iufoje entreprenis vojaĝon kaj ĉiu el liaj<sup>2</sup> sklavoj devis porti ion. Ezopo elektis la pankorbon. Liaj kamaradoj tre miris pri tio, ĉar tiu estis tre peza kaj Ezopo estis malforta. Sed ĉi tiu diris nenion<sup>3</sup> kaj trankvile ekiris post la aliaj kun la peza ŝarĝo sur sia<sup>2</sup> dorso. Post la unua manĝo la korbo jam estis malpli peza, post la dua ankoraŭ pli, kaj fine ĝi estis tute malplena kaj Ezopo povis porti ĝin sen ia peno. Tiam la aliaj kompreenis, ke li elektis saĝe.

#### klarigoj / atentigoj

##### -<sup>1</sup> : fabloverkisto = verkisto de fablo

Attention aux paronymes "fablo" kaj "fabelo".

*définitions de PIV, la Plena Ilustrita Vortaro :*

**fablo** estas rakonto, plejofte versa, en kiu agas kaj parolas bestoj aŭ objektoj, kaj per kiu oni prezentas moralinstruon... (**fablo** = fable, apologue)

**fabelo** estas distra rakonto, precipice destinita al infanoj, pri fiktivaj aventuroj de herooj kun supernaturaj kapabloj. (**fabelo** = conte, fiction)

##### -<sup>2</sup> : lia / sia

Les deux mots sont la traduction de son, sa.

> Dans "liaj sklavoj", "lia" se rapporte au sujet "ĉi tiu" (la komercisto) du verbe "entreprenis", et l'expression "ĉiu el liaj sklavoj" est elle-même sujet du verbe "devis".

> Dans "sur sia dorso", "sia" se rapporte également au sujet "ĉi tiu" (Ezopo) du verbe "ekiris" mais se trouve dans un groupe complément de ce verbe, et non dans un sujet.

**à retenir** : "sia" n'est jamais dans un sujet mais précède toujours l'objet (complément) possédé par le sujet.

##### -<sup>3</sup> : ĉi tiu diris nenion = celui-ci ne dit rien

> en français : double négation (ne... rien)

> en espéranto, la double négation n'existe pas (nenion) - autre solution : ĉi tiu ne diris ion



### Plurelekta demandaro

laŭ verkoj de Robert Llorens  
eldonitaj de Espéranto-Info

#### 1 - gramatika

- a) Tiu urbo estas mir.....
- 1 - ~inda ; 2 - ~ebla ; 3 - ~ema
- b) Tio estas far....., vi nur devas deziri tion fari.
- 1 - ~inda ; 2 - ~ebla ; 3 - ~ema
- c) Li havas ..... da mono, ke li ne scias, kion fari per ĝi.
- 1 - tiam ; 2 - tiom ; 3 - tiel

#### 2 - vorto-trezora

ĉ) elektu "ami", "amori" aŭ "sati" por traduki la francan "aimer"

- 1 - une personne : .....
- 2 - une chose : .....
- 3 - sexuel : .....
- d) elektu "aero", "ario" aŭ "aspekto" por traduki la francan "air"
- 1 - gaz : .....
- 2 - apparence : .....
- 3 - musique : .....



### Superzam'

proponita de

Jean-François Cousineau

1. En kioma jaro okazis la Unua Universala Kongreso de Esperanto ?

a- 1897 b- 1901 c- 1905

2. Kiu el la jenaj verkoj de Baghy ne estas romano ?

a- Verdaj Donkihotoj b- Viktimoj c- Sur sanga tero

3. Kiu akordeonas ĉe Kajto (origina grupo)?

a- Ankie b- Marita c- Marian

4. Kio estis la patro de Zamenhof ?

a- instruisto b- notario c- komercisto

5. Kiu korelativa finaĵo signas direkton ?

a- e b- al c- en

6. Kiu estas la plej longa rivero en Norda Ameriko ?

a- Misisipo b- Misuro c- Sankta Laŭrenco

### Plurelekta demandaro

#### 1 - gramatika

a : 2 ; b : 1 ; c : 3

#### 2 - vorto-trezora

ĉ1 : helpo ; ĉ2 : helpanto ; ĉ3 : helpisto  
d1 : kudrilo ; d2 : pinglo ; d3 : nadlo

### Solvoj de la demandoj

en EP 104

printempo 2016

### Superzam'

1 c > Varsovio ; 2 c > Pilgrimo ;

3 c > La velŝipo Magdalena ;

4 a > 1859 ; 5 a > am

6 a > Amazono (6700 km)



## El la mesaĝkesto de la legantaro

### Philippe Combot

Dankon pro via gazeto. Mi trovis nur du koboldajojn : p. 4 *Saint-Raphaël* : la fina « l » ne estas kursiva, kvan-kam ĝi devus ; p. 6 : *Oprhys* devus esti *Ophrys*. El tiuj du faktoj, ĉu vi sukcesus verki mikronovelon ?

*respondo de la red.*

« akraj okuloj », mi skribis pri vi en la n°103. Plian fojon vi pravigas ĉi tiun esprimon... kaj oficiale iĝas nia « akrokululo » ! Dankon pro via atentega legado ! Sed pri verkado de mikronvelo... ĉu mi vere kapablus tion fari sen la trafaj konsiloj de Miguel Gutiérez Adúriz, kies kurson mi ne sekvis ?

### Josée Boccadifuoco

Dankon pro sendo al mi de via gazeto ; mi ĉiam legas ĝin kun granda plezuro. De kelka tempo, en *Montpellier*, nia kutima gazeto ne aperas pro... diversaj kialoj. Do, mi des pli dankas vin. Amike mi salutas vin kaj la geamikojn de via federacio.

*respondo de la red.*

Estas plaĉe ekscii, ke nia gazeto estas legata ekster niaj federaciaj limoj ! Dankon pro viaj afablaj salutoj transdonitaj, tra tiu ĉi gazeto, al la tutaj legantaro kaj federacionaro.

### Nelly de Massas

Mi ĵus ricevis la gazeton n°104. Eble mi forgesis diri al la Provenca Federacio, ke mi translokigis. Jen mia nova poŝtadreso [...].

*respondo de la red.*

Vi ne forgesis sciigi al mi pri via transloĝigo, kaj mi forstreks vian nomon el la listo de la ricevontoj de la reta versio. Ĉu tiun ĉi vi tamen ricevis ? Se temas pri la papera versio, eble mi efektive forgesis peti de la sendozorgantoj, ke ili nuligu vian adreson.

### Renée Triolle

[Mi neniam atentis, ke sur la tombo de *Honoré Bourdelon* estas memorabulo... Esperanto ne estis la sola fako en kiu *Honoré Bourdelon* fakis....]

*respondo de la red.*

Dankon, Renée, pro la ege interesaj informoj, kiujn vi sendis pri *Honoré Bourdelon*. Vian mesaĝon mi metis inter rektajn krampojn, por atentigi, ke ĝi ne estas kompleta : nur la komenco kaj la fino tie estas. Via tuta mesaĝo troviĝas en la ĉigazeta artikolo pri *Honoré Bourdelon*.

## À noter sur votre agenda



### dans notre fédération

#### Forums des associations

**septembre 3** - Manosque (Parc de Drouille)

**septembre 4** - Fréjus (Base Nature)

**septembre 4** - Marseille (Parc Borély)

**septembre 10** - La Ciotat (Port Vieux)

**septembre 22-24** - Manosque : Les Correspondances  
(voir infos en page 6)

**novembre 19-20** - Le Beausset : fin de semaine culturelle (*bulletin d'adhésion dans le n° d'octobre*)

**2017 - mars 4-11** - Les Issambres

Mediteranea Esperanto-Semajno

(*bulletin d'adhésion papier dans le n° d'octobre - PDF joint à ce n°*)

**1<sup>er</sup> jeudi de chaque mois** - Marseille

Café linguistique à l'Equitable Café

54 Cours Julien, 13006 Marseille

### en France

#### Château de Grésillon - Baugé (49)

**août 6-13** - semaine d'étude de l'espéranto

**août 21-28** - semaine festive pour enfants, ados et familles, pour bien préparer la rentrée

infos : <http://gresillon.org>

#### Kvinpetalo - Bouresse (86)

**août 15-19** - pratique de la langue - plusieurs niveaux

**octobre 24-28** - stage pédagogique sous la direction de Katalin Kovats

(niveau minimum pour participer : B2)

infos : <http://www.kvinpetalo.org>

**2017 - mai 25-28** - Mandres-les-Roses (94)

Congrès d'Espéranto-France

